APERAS ĈIOTAGE.

# VERDA ĴOĈO DE DOKSY

REDAKTORO ANT. SLANINA

LERNEJO

AMUZA GAZETO DE SOMERA ESPERANTO 1947.



26.VII.1947.

## ESPERANTO 60jara --- 60 let ESPERANTA.
## 1887 - 26.VII.- 1947

Hodiaŭ festas la tutmonda esperantistaro grandan feston, la 60jaran datrevenon de la estiĝo de Esperanto. La 26an de julio 1887 eliris en la Varsovia presejo Kelter maldika, grizkovrila tridekokpaĝa broŝureto, enhavanta 16 gramatikajn regulojn kaj 917 radikojn de la "Lingvo Internacia", kies aŭtoro estis Dro Esperanto, humila okulkuracisto, kiu post jaroj da interna kaj ekstera batalado, da mizera kaj penega kuraĝis aperigi libron, kiu entenis en si la ĝermon de la lingva revolucio, kiu famigis la nomon de Dro L.L. Z a m e n h o f kaj fondis tutmondan movadon por la helpa lingvo universala Esperanto.


60 jarojn jam Esperanto servas al la homaro. Ĝi fariĝis lingvo viva, kies "interna ideo" gvidas la homojn al reciproka interkompreniĝo, al eterna paco. Oni povas hodiaŭ kuraĝe diri, ke en "Esperantujo" la suno ne subiras. La posedo al Esperanto fariĝis kultura riĉo por la opulo, nacio kaj ŝtato. Ne estas plu problemo, ĉu kaj kia lingvo fariĝos dua lingvo de ĉiu homo, ĉar Esperanto jam venkis.
VIVU ESPERANTO ! AŤ ŽIJE ESPERANTO ! Pi

Dro L.L. Zamenhof :


Al la "Esperantisto". ✓

En la bona hor! Ni aŭdis la signalon
kaj bataleme saltas nia koro.
Konduku nin, komencu la batalon
sub bona stelo, en feliĉa horo!

Amikoj de proksime, malproksime
salutas vin, ho nia luma stelo!
Konduku nin, senhalte kaj sentime,
al nia granda, sankta, glora celo!



Ne tre facila estos nia vojo
kaj ne malmulte ankaŭ ni suferos;
sed batalante, kun plej granda ĝojo
senhalte ni laboros kaj esperos.



For estas jam la baroj de l'komenco,
l'unua muro estas trarompita,
kaj dolĉa estos nia rekompenco,
kiam la celo estos alveninta.

✓ Verkita en la j. 1893 por la unua gazeto esp. "La Esperantisto", redaktita de Dr. Zamenhof kaj aperinta 1889 - 1895 en Nürnberg.

NOVAĴOJ.

V rámci Letní školy esperanta dnes na letním jevišti divadelní představení.
Jar. Vrchlický:
"Noc na Karlštejně"
v esperantském překladu prof. M. L u k á š e.
Pro účastníky kursů návštěva povinná. Začátek v 21 hod. Za nepříznivého počasí koná se představení v divadelním sále "U Jelena".

-.-

FILMADO SUR STRANDO.

Hieraŭ posttagmeze estis sur strando de la lago granda tumulto inter esperantistoj. Speciale niaj belulinoj estis en ekstazo. Kial? Venis ja filmisto de filmĵurnalo por filmi anojn de SELejo. Do ĉiuj ĉeestantoj havos okazon vidi sin en sia hejmloko sur ekrano de la kinejo.

-.-

Letní škola Esperanta v Doksech ve f i l m u !

Zvukovým filmovým týdeníkem nám bylo přislíbeno, že bude Letní škola Esperanta filmována. Při této příležitosti budou též učiněny záběry z divadelní hry Noc na Karlštejně, hrané esperantsky. Filmování bude pravděpodobně provedeno ve středu 30. července 1947.

-.-

BONVENON al ĉiuj vizitantoj kaj gastoj, kiuj venis por vidi la Esperantan prezentadon. Dankon por ilia subteno kaj morala kaj financa.

Somera Esperanto-Lernejo.

-.-

Instruisto: "Formu frazon kun kondicionalo."
Lernantino: "Mi dezirus, ke estu jam fino de la leciono".

-.-

"Ĉefafero estas ridi. Ne gravas, je kies kostoj."

-.-

"Popolo, kiu ne kuraĝas ridi pri si mem, ne estas matura."

-.-

La inteligentaj esperantistoj estas abonantoj de "Verda Voĉo".

-.-

"Verda Voĉo" kostas unu kronon. Efektive. Oni povas diri, ke ĝi estas la plej - malkara gazeto.

-.-

LINGVA ANGULO.

M E M kaj S O L A.

La prezidanto mem preparas projekton; mi eĉ mem uzas tiujn vortojn; fiziko estas la nom' de la scienco mem; mi parolas ne pri la aĝo de la okupo mem, sed pri la stato, en kiu ni troviĝas; mi amas lin, kiel min mem; malsaĝuloj kreskas mem sen pluv' kaj sem'; la vivo jam mem solvis la diritan demandon.
Ili apartenu al vi sola, sed ne al aliaj kun vi; se vi blasfemas, vi sola suferos; li sola estas kulpa; mi estis filo dorlotata kaj sola de mia patrino; sufiĉe frue ĉe mi formiĝis la konscio, ke la sola lingvo internacia povas esti nur ia neŭtrala; la decidoj pri lingvaj aferoj apartenas sole al la L.K.; sole en okcidenta Afriko ekzistas ses aŭ sep literaturoj.

-.-

IGI kaj IĜI.

Laboro lacigas; tiu flamo lumas, sed tute ne varmigas; igas necese, ke ni venku; ni devas labori por kunigi, ne por disigi; krucigi bastonojn; garbigi grenon; polvigi; vicigi; gustigi manĝon; albordigi; enkadrigi; enkorpigi; enkasigi; endanĝerigi; endormigi; enuigi; kuŝigi; starigi; pendigi.

La situacio akriĝas; larmoj virinaj baldaŭ sekiĝas; aliĝi al ia ideo; kuniĝi en la domo de siaj gepatroj; aliĝi al ia ideo; tagiĝas; post longa vintro printempiĝas; enlitiĝi; surteriĝi; mia ĉapo, flugante, pendiĝis sur la branĉoj de la arbo; laŭ sia laboro laboristo taksiĝas; sub la pankta signo de l'espero kolektiĝas pacaj batalantoj; malfruiĝi.

-.-

Dormema. "Francisko, vi denove tre longe dormis hodiaŭ matene. Kion tio signifas?" "Mi ne scias, panjo, eble estas kaŭzo, ke mi tiel malrapide dormas."
Preĝo de lernantino. "Kara Dio, Vi estas ĉiopova, faru ke Budapesto estu ĉefurbo de Rumanujo!" "Sed, mia infaneto, kian intereson vi havas je tio?" "Ĉar mi tion skribis kiel lernejan taskon."

-.-